



Kajeroj el la Sudo

La 30^a jaro



Bulteno de la Hispana Asocio de Laboristoj Esperantistaj

<http://www.gazetoteko.com/kajeroj/k101/k101.html>

ISSN 1886-1997 (Reta versio)

ISSN 1886-1938 (Printita eldono)



Mankas Rodolfo Canet Martín

Kajeroj**el la Sudo**

*Bulteno de la Hispana Asocio de
Laboristoj Esperantistaj (HALE).*

**Calle Jabonerías, 6.3° D
30010 Murcia
Hispanio**

ISSN 1886-1938

1886-1997 (reta versio)

Enhavo

Redaktore: Nova epoko.....3

La krimo de Floridablanko...4

Ni ĉiuj estas nazaretanoj.....6

La peko de l' taliban': 8 Nova
homo.....14Demokratio, libereco,
respekto..... 17La Farono, ĉapitro 50^a..... 18

Mankas amiko.....27

Prezidas: Johano A. Cabezos.

Redaktas: Jesuo de las Heras.

Korektas: Jozefo Pina.

Retskribu al: kajeroj@gmail.com

Oni povas reprodukti la enhavon, kondiĉe,
ke oni citu la originon.

Pri la enhavo de la artikoloj respondecas ties
aŭtoroj, ne la redakcio.

Ni ne korespondos pri nepetitaj artikoloj,
kvankam ni klopodos publikigi ĉiun artikolon,
kiun ni trovas interesa kaj kies enhavo
mistraktas nenium personon.

Kovrilo: Rodolfo Canet Martín, ĝisosta esperantisto kaj kara amiko al
tiuj, kiuj konis lin, ŝus mortis en sia hejmo alikanta.

Pagmaniero: aliĝu al HALE kontraŭ €10
jare por ricevi la surpaperan version de
nia magazino.

Konto **ES30 2100 4617 4122 0011 5275.**


Notu vian nomon kaj la jaron, kiun vi pagas.

Poste, sendu noton al
kajeroj@gmail.com

Ankaŭ eblas protekti la magazinon pere de
donaco al la menciita konto, se oni deziras helpi
kaj tamen ne ricevi la surpaperan version.

Tute kreita kaj traktita per senpagaj linuksaj rimedoj:
OpenOffice Writer, Gimp, Scribus, gFtp kaj Bluefish.

Nesubskribitajn
artikolojn verkis
la redaktoro.



Redaktore **Nova epoko** malnovaj ideoj...

De kelkaj jaroj la prezentado de la bulteno antaŭ vi ne estis ĉiam akurata. Mi esperas, ke en tiu ĉi nova cento da nia numeraro, tio ne plu okazos. pro tio novan numeron sendas mi al vi, leganto, nur kelkajn tagojn post la antaŭan.

Nia sinteno estas daŭre sociala, politika kaj kultura, kaj pro tio ni havas plenplenon da temoj inkluzivi en nian magazinon, kvankam la kvanto de niaj paĝoj estas limigitaj laŭ la nombro. Pro tio ni atentigas al la politikaj scenoj hispana kaj aliloka, ne forgesante pri tio, kio okazas en la kultura kaj civiliza mondo. Pro tio ni ĵetas rigardon al grava evento, kiu influis negative en la konsisto de la Hispana Imperio antaŭ tri jarcentoj. Jen la peko de denaska mursjano Jozefo Moñino kaj Redondo, alidirite Grafo de Floridablanko.

La registaro de Hispanio ŝajnas ne havi gravajn aferojn plibonigi nian bonfarcon, kaj pro tio ĝi nur prezentas pridiskuteblajn aferojn, tiel ke oni ne konsciu pri tio, ke ili faras nenion profiteblan al ni. Lasta elpenaĵo estas, ke manĝaĵoj devas porti literojn laŭ sia plisaneco, el verda al ruĝa.

Jozefo Pina surprizas nin per longa artikolo pri persekuto pro religio en islamaj landoj. Bedaŭrinde tiuj politikaj partioj, kiuj de-

noncas diskriminacion fakte diskriminacias pri diskriminacio. Eble estas diskriminacioj kaj diskriminacioj, kaj se ne eblas kondamni plenplenajn eŭropajn civilizojn, estas nenio defendebla. Por ka politiko, kiu emas detrui, sed ne konstrui.

Ŝajnas, ke parto de la politikaj partianoj de Hispanio opinias, ke tiuj, kiuj ne aprobas ties ideojn estas faŝistoj kaj ne rajtas eĉ vivi. Tion mi aŭdis la lastan 14^{an} de novembro, kiam mi iris aŭskulti konferencon, kaj poste politikan prelegon de dekstra partio VOX. Inteligentaj personoj vere bezonas aŭskulti tion, kion malamiko diras, sed fanatikuloj jam scias, ke neniu krom ili mem pravus pri ĉio ajn, kaj sekve oni devas brakumi iliajn ideojn aŭ morti. Kaj tio estas maltrankviliga pro grava kaj trista, ĉar ĝi signifas, ke oni ne multe lernis laŭ la lastaj okdek jaroj. Ankoraŭ duono da Hispanio ne volas morti pro la volo de la alia duono. Unue oni provos agi, eĉ se realo diras, ke ili denove malvenkos.



Kopiante procedojn de naziuloj, gestudentoj protestas kontraŭ *faŝismo* kaj *naziismo*...

La krimo de Floridablanka

Mursjo honoras du homojn, kiuj malutilis al historio de Hispanio kaj de Mursjo, ĝenerale. Pri la unua, Antonete Gálvez, estas strato dediĉita en la urbo, kaj mi iomete parolis pri li lastnumere. Kiam mi pli akurate reserĉos pri lia vivo kaj misfaroj, mi denove dediĉos artikolon al li. La alia estas la Grafo de Floridablanko, fama ministro de la korto de Reĝo Karlo 3^a de Hispanio, kiu kunhavis kun nia Grafo la malhonoron forpeli la Kompanion de Jesuo el ĉiuj hispanaj teritorioj. La celo de tiu ĉi artikolo estas pruvi, ke tio estis krimo kontraŭ homaro kaj sekve serĉi la kondamnon fare de decaj homoj hodiaŭaj.

Sed kio kaj kiuj konsistigis la Kompanion de Jesuo? Je la jaro 1521^a kapitano Ignacio de Lojola estis vundita en batalo, kaj tio lamigis lin la ceteran parton de sia vivo. Anstataŭ ripozi kaj vivi el arma pensio, li pilgrimis al Jerusalemo kaj poste fondis ordenon religian kune kun aliaj homoj, kaj la Papo Paŭlo 3^a aprobis kaj benis ĝin la 27^{an} de septembro de 1540^a, post kiam li legis pri la vivmaniero kiun ili celis adopti, kaj la projektoj, kiujn ili intencis fari. Tiu ordeno estus baldaŭ konita kiel La **Kompanio de Jesu'**, ĉar Ignasjo konceptis ĝin same kiel reĝimenton da disciplinitaj preĝistoj, kiuj disvastigos la vorton de Dio pere de malmola laboro kaj diskonigoj de scienco kaj kulturo ĉie en la mondon. Ni memoru, ke la Imperio Hispana kovris la tutan terglobon, kaj sekve ili laboris en diversaj lokoj de Eŭropo, kiel Albanio, Rusio, la tuta Ameriko, Afriko, Oceanio, kaj eĉ Japanio, Koreio kaj Ĉinio.



Estas rimarkebla ilia laboro en Ameriko, kie ili fondis la *Enkomendojn*, kiu estis speco da fortikaĵoj faritaj el ligno kaj indeĝenoj nomis *Palenke*, ene de kie ili protektis, per malmulte da soldatoj, indianojn kontraŭ kapto fare de portugaloj kaj nederlandanoj, kiuj poste vendus ilin kiel sklavojn. Ili alfabetigis la indianojn, kaj kverelis kaj denoncis hispanajn soldatojn, kiuj

maljuste agis kontraŭ indianoj aŭ malriĉaj hispanoj. Ili ja havis armean disciplinon kaj altan sencon de justico. Kaj tio timigis la reĝon, ĉar li ne efike kontrolis ilin. Se oni vidis la filmon *La Misio*, de Roland' Joffe, oni povas vidi ekzemplon pri tio, kio jesuitoj faris.



Jozefo Moñino, Grafo de Floridablanko.

Nu, oni povus diri, ke homoj, kiuj faris tiun altan kaj necesan taskon ricevus nur dankon kaj helpon de la Hispana Reĝo, ĉu ne? Sed tiu monarĥo, Karlo 3^a, vere timis, ke li ne povas kontroli ilin, ĉar ili respondecas nur antaŭ la papo mem, kaj pro tio li malpermesis ilin labori kaj eĉ vivi en teritorioj de Hispanio en ambaŭ kontinentoj pere de **Pragmática Sanción** (leĝo praktika) je la 2^a de aprilo de 1767^a. Malgaja tago por amerikanoj, ĉar pro tio ses mil sindonaj laboristoj por paco kaj religio devis forlasi Hispanion kaj Ameriko. Ne plu indianoj havis senpagajn instruistojn pri legado, skribado kaj terkulturo, ĉar reĝo sendis neniun okupiĝi pri tio, kiuj tiuj religiuloj faris nome de Dio. Sed la krimo de tiu reĝo iris pluen: kune kun reĝoj de Portugalio, Francio kaj Sicilio, li komplotis, por ke *La Kompanio* estu malpermesata de la Papo mem! Sed Klemento 13^a rezistis premojn, ĝis sia morto. Sed Jozefo Moñino

mem konfesis perletere, ke finfine sukcesis konvinki ola sekvintan papon, Klementon 14^{an}, la 21^{an} de julio de 1773, pere de dokumento **Dominus ac Redemptor** (*Sinjoro kaj savinto*) disigis la Kompanion de Jesuo, kiu tiom da bono provizis al nova kaj malnova kontinentoj. Forpelitaj de Eŭropo, ties anoj trovis rifuĝejon en Rusio, kaj poste en Usono, kie ili fondis ties unuan universitaton, tiun de Georgetown, je 1789.

Jen la krimo de Jozefo Moñino, kiu ricevis titolon el la hispana reĝo. Li jam havis bienon en Mursjo, nomita Floridablanca. Sekve, la moŝta reĝo de Hispanio nomumis lin **Grafo de Floridablanka**, kiu fakte estis nur ornama titolo, male al normalaj, kiuj havis akompanantan stipendion. Honto al ili du kaj grafo kaj reĝo.



Karlo 3^a de Hispanio.

NI ĈIUJ ESTAS NAZARETANOJ

La 3^a Internacia Kongreso pri Religia Libereco.

Okazis en hotelo de Madrido, de la 19^a ĝis la 21^a de oktobro de 2018^a, la tria eldono de la internacia kongreso supre citita- ĉifoje fokusita al la geinfanoj kaj al la gejunuloj persekutitaj kaj diskriminacitaj pro siaj religiaj kredoj.

Laŭ raporto de la Konsilantaro de la Katolika Papo Francisko por la Interreligia Dialogo, ume de 100 ĝis 150 milionoj da kristanoj suferas persekutojn ĉiujare kiale de siaj religiaj kredoj. La kristanoj estas la plej persekutata gento el la mondo, kaj ties religio estas la plej perfortata el ĉiuj, kalkulante kun la pli alta nombro de mortigitoj kaj forpelitoj. Dum nia socio juste denunciis la rasekstermojn kaj amasbuĉojn okazintaj en aliaj epokoj, ĝi tamen daŭre ignoras aŭ subtaksas la plej kruelan amasbuĉadon el la historio de la homaro: tiun kontraŭ la kristanoj. Estas nekompreneble ke oni defendas tiel harde kaj kun tiom da ekonomiaj rimedoj; krom kun tioma amaskomunikila atento; bagatelajn aferojn dum, samtempe oni ignoras ke po ĉiuj 5 minutoj 1 kristano estas murdata pro sia kredo.

CELOJ DE LA KONGRESO:

La Kongreso celas konsciencigi la estrarojn, sociojn, kaj amaskomunikilojn de la okcidentaj landoj pri la neceso firme alfronti la plej gravan homaran krizon el la mondo ekde la 2^a mondmilito, t.e. : la amasa buĉado - ĉefe de kristanoj- sed ankaŭ de aliaj religiaj minoritatoj, fare de ekstremismaj islamistoj en landoj kiel Sirio, Irako, Pakistano, Niĝerio, Egiptio, Libio, Sudano, Kenjo, Saŭdarabio, Jemeno, ktp.

ANTAŬKONGRESO:

De la 15^a ĝis la 18^a de oktobro okazis preĝaj tutnoktaj kunvenoj en 132 urboj de Argentino, Ĉilio, Kolombio, Meksikio, Nikaragvo, Peruo, Portugalio kaj Hispanio. La merkredon 18an de oktobro, je la 5^a posttagmeze, volontuloj de la organizaĵo **MasLibres.org** kun kelkaj partoprenontoj de la Kongreso prezentis peton —apogita de multaj rubrikoj— en la Hispana Ministerio pri Eksterlandaj Aferoj. La peto tekstis jene:

Tiun ĉi peton oni transdonu al la Alta Komisiito de Unuiĝintaj Nacioj pri Homaj Rajtoj, Sr-ino Michele Bachelet; al la SpecialaRaportisto pri Religia Libereco, Ekscelenca Moŝto (EM) Ahmed Shaheed; al la Raportisto de la laborgrupo pri arbitraciaj

arestoj, EM José Antonio Bergara Bermúdez; al la Konstanta Ambasadoro de Hispanio antaŭ la oficejo de UN, EM Agustín Santos Maraver; kaj al la Speciala Sendito por la Kuraĝigo de la Liberecoj de Kredo kaj Religio for de la Eŭropa Unuiĝo, EM Jan Figel.

Ekscelencaj Moŝtoj,

Milionoj de infanoj kaj junuloj malhavas homajn rajtojn kaj suferas perfortojn pro siaj religiaj kredoj, en tro da landoj. De 2015^a ĝis 2017^a okazis la pli granda persekutado kontraŭ la kristanoj el la tuta historio, kaj tiu ĉi persekutado estis ege pli doloriga kaj danĝera ĉar ĝi trafas al infanoj kaj gejunuloj ankaŭ.

- Pro viaj altaj postenoj vi povas kuraĝigi al UN por apliki la adekvatajn kaj efikajn rimedojn cele al la protekto de la persekutataj komunumoj kristanaj ĉie ajn en la mondo.
- Vi povas gvidi iniciaton kiu instigu la membrojn de la Ĝenerala Azambleo por krei la “Universalan Tagon de la Religia Libereco” kun la celo agnoskigi la rajton de ĉiu ajn homo publike praktiki sian religian kredon.
- Kadre de viaj fakaj kapabloj, mi petas ke vi pripensu alpreni tiujn ĉi iniciatojn, kaj aliajn de vi konsiderataj kiel efikaj por protekti la vivon kaj rajtojn de la kristanaj infanoj kaj junuloj, kiuj suferas persekutojn pro siaj kredoj.

Mi estas certa ke vi estos speciale sentiva al tiu ĉi peto, kiu estas kunhavata de milionoj da civitanoj el la tuta mondo.

Multajn dankojn

KONGRESAJ EVENTOJ:

Ĝus enirinte la areon rezervitan por la Kongreso oni trovas ekspozician salonon, kie, sur ekranoj oni povis vidi projekciojn pri diversaj landoj trafitaj de la problemoj pridebatotaj okazantaj en landoj kiel: Suda Sudano, Irako, Pakistano, Hinda Unio, Niĝerio, Kenio, Sirio, Libio, Jemeno kaj Egiptio. Apud ĝi oni povas rezervi kapaŭskultilojn por profiti la samtempajn tradukojn de la prelegoj okazantaj.

Okazis du interesaj debatoj gvidataj de tre konataj ĵurnalistoj, profesoroj kaj historiistoj – inter ili elstaras hispanoj kiel Javier Esparza kaj Herman Tersch, kaj la egipta profesoro Shamir Khalil. Ili polemikis pri la kunkatenitaj temoj: “ Islamo, islamismo kaj

islamofobio” kaj “Ĉu islamo estas religio de paco?” Ili resume konkludis ke:

- La muzulmanoj majoritate estas ordinaraj homoj kiuj nur volas trankvilajn vivon kaj feliĉon.
- En la kerno de Korano estas dueco de paco kaj milito (ĝihado) kaj, ĉar Mahometo mortinte, ne lasis ia ajn interpretivan hierarkion — malsame de tiu ekzistanta, ekzemple en la katolika eklezio— ĉiu muzulmano pia devas decidi mem ĉu esti mizerikorda kaj tolerema (sekvante la instruojn de Mahometo en la 1^a parto de Korano (tiu kiu koincidas kun la periodo de lia restado en Meko) ĉu, male, esti militema kaj altrudi sian religiŝon al la nemuzulmanoj (sekvante la instruojn de la Profeto ekde ties alveno en urbon Medina). Ambaŭ elektoj povas esti al muzulmano same trafaj morale.
- La ĝihadisma grupo DAĜŜ-o estas islamo mem aplikata al la ĉiutaga vivo, ĉar en islamo ne ekzistas disiĝo inter la ŝtato kaj la religio (ŝtato devas, do, esti instrumento de la religio de la Profeto).
- Okazas en kelkaj landoj de Eŭropo muzulmanaj getoj. Tie, la kunvivado kun la kredantoj de aliaj religioj kaj ateistoj estas facila kondiĉe ke la maltolerema islama minoritato ne superas 15 %n el la tuta komunumo – se la procento de tiuj estas pli alta ili sukcese klopodas altrudi Ŝario-n (ensemblo de juraj kaj religiaj normoj inspiritaj en Korano) kun la pasiveco de la ceteraj muzulmanoj – kiuj ne volas religiajn polemikojn- kaj konsekvence, la geto ne plu similas al la ĉirkaŭaĵoj de la gastiga lando, sed al tiu de islama maltolerema reĝimo. Iom post iom, la geto vakuiĝas de nemuzulmanoj kaj tio devenigas malriĉecon, edukajn deficitajn, ĝihadistojn kaj la rifuzon kaj timon de la ceteraj gentoj.
- Ne ekzistas en la landoj de Eŭropo islamofobio sed kristanofobio. Plimulto el la okcidentanoj vantas esti akceptemaj kaj sentas orgojlon esti toleremaj al la muzulmanaj elmigrintoj. Ofte la okcidentaj estraroj kaj ĵurnalistoj silentas aŭ cenzuras kiel politike nekorekta informojn pri seksperfortoj aŭ konfliktoj okazigitajn de muzulmanaj radikaluloj. Krome, por ŝajni politike korektaj la estraroj pli kaj pli privilegias tiujn elmigrintojn per ĉiuspeciaj helpoj kiujn ne povas atingi malfavoritaj enlandanoj, tamen ne estas politike korekte kritiki tiun malegalecon. Kutime la okcidentaj estraroj favoras islamon por detruigi la influon de la kristanoj, pro ties opono al la lobio de sodomiuloj, transgenruloj, kontraŭfamiliistoj, kaj abortistoj.

- La fundamento de la demokratio estas la persono: tial fiaskis la t.n. “araba printempo” ĉar ne eblas demokratiigi sociojn (kiel la muzulmanaj) kies fundamenton estas la aparteno al konkreta religio, kaj ne la persono mem.
- Shamir Khalil diris ke Eŭropo stultas kiam ĝi obstinas ignori ke la islamistoj profitas ĝian toleremon por islamigi, kaj poste (en la estonteco), regi Okcidenton. Li metis kiel ekzemplojn la Turkion de Erdogan kaj Saŭdarabion; kiuj financas moskeojn de radikaluloj kaj islamismajn partiojn en Eŭropo.


ATESTOJ DE VIVANTAJ MARTIROJ:

“LA KRISTANOJ EN ISLAMUJO”

Prelego de Michael Jones.

Mia nomo estas pseŭdonimo- pro sekureca kialo. Mi naskiĝis en Egiptio en 1964^a kaj fakiĝis pri Gvidanteco kaj Entreprena Administraciado. Mi estas evangelia kristano gvidanto de protestanta grupo. Mi loĝas ĉe unu el la ĉefaj urboj de Egiptio. Mi edziĝis kaj havas du plenkreskajn filojn. Mi estas veterano de unu el la ĉefaj egiptaj evangeliaj eklezioj de Kairo, kaj en ĝi, mi, kune kun mia edzino donas servon ekde 1990^a.

La kristana komunumo de Egiptio estas la plej granda el ĉiuj kristanaj de Mezoriento. Ĝi umas de 10-15% el la tuta loĝantaro. Tamen, en socio superregata de muzulmanoj, la kristanaro- kaj eĉ pli la infanaj kristanoj- alfrontas kontraŭstaron, superŝuton kaj persekutadon je multaj aferoj de sia ĉiutaga vivo. En la publikaj lernejoj – kaj pli en tiuj de la vilaĝetoj- la kristanaj infanoj estas ofte timigataj de muzulmanaj fanatikuloj, kiuj primokas ilin pro ties kredo je Jesuo Kristo. La nesufiĉa scio de gepatroj kaj profesoroj malebligas ilin kontraŭstari tiajn defiojn kontraŭ la kristana teologio, kio lasas la kristanajn infanojn frustritaj kaj kun tre pova sento de malvenko.



Kiel ekzemplo de tio, Mina, 9-jaraĝa infanino kiu estis la sola kristano en sia klasĉambro estis daŭre malzorgata kaj marĝenata de siaj profesoroj kaj de la ceteraj infanoj de sia klaso. Antaŭ tio, ŝiaj gepatroj malkonsilis ŝin ludi kun siaj muzulmanaj samklasanoj evite al tiuj timigaj fitraktoj. Iun tagon Mina atingis sian domon kaj

simple disrompis sian biblion dirante “Mi volas esti musulmana por vivi normalan vivon kiel la ceteraj infanoj”.


Mi kaj aliaj evangeliaj ministroj pri kulto helpas la kristanajn infanojn – per simpligitaj lernomaterialoj kaj allogaj rimedoj-kompreni la fundamentajn teologiajn punktojn, t.e.: La unuecon kaj tripersonecon de Dio kaj la aŭtentikecon de la Biblio.

“KIAM STUDI ESTAS VIVORISKE “

Prelego de Frederick Gitonga:

Mi naskiĝis en Kenio la 22an de novembro de 1994^a. Mi gradaniĝis pri Sociaj Sciencoj en 2018^a.

Iam, kiam mi studis en la Universitato de Garissa- la frumateniĝon de la 2a de aprilo de 2017^a, kelkaj teroristoj ĝihadistoj subite invadis la universitatan areon kaj murdis 147 homojn (ĉiujn kiuj ne povis prui sian muzulmanan apartenon.



Ĉirkaŭ la 5^a kaj duono matene la teroristoj atakis nian universitaton. En tiu momento la studentoj dormis en siaj dormejoj de la studentaj loĝejoj. Grupo de knaboj de la Kristana Unuiĝo, kiel ili kutimis, estis preĝante azemblee. Subite la murdontoj invadis la lokon kaj pafis kontraŭ la ĉeestantoj. Ili murdis ĉiujn kiuj trovis antaŭ si kaj ne povis prui ke ili estas muzulmanoj. Kvankam mi kutime ĉeestis tiun azembleon, mi ne troviĝis en la universitato tiam. Tiu cirkonstanco ŝanĝigis mian vivon: do., mia pretervivo formas parton de projekto de Dio por ke mi povu doni al la mondo mesaĝon. Mi kredas ke la teroristoj atakis la universitaton pro timo al ke la kristana majoritato influu negative sur la muzulmanajn komunumojn, kulturon kaj religion: jen denove fiagon por senkuraĝigi la kristanojn de nia regiono praktiki sian kredon. Mi pardonis la teroristojn ka preĝas por ke ili konu la Veron kaj ke la Vero liberigu ilin. Mi atestas ke mia samkredanoj estis kruele buĉitaj de teroristoj – kiuj agnoskis sin kiel muzulmanoj. Mia mesaĝo al la mondo estas :Neniu religio sur Tero kiu vantas adori la veran dion de Abrahamo, Isaako kaj Jakobo povas toleri tiom da krueleco nome de Dio. La socioj kaj UN devas batali kontraŭ tiu


kruela blasfemo kaj ne timi diri ke la genocido kaj persekuto de kristanoj kaj de aliaj religiaj minoritatoj estas la plej grava krimo kontraŭ la homaro de nia 21^a jarcento. Ĉiuj viroj kaj virinoj estas egale dignaj kaj neniu rajtas mortigi ilin pro ties kredo.

VIVO SUB LA LEĜO DE BLASFEMO

Prelego de Aslam Malik.

Mi naskiĝis en Lahore (Pakistano) la 31an de decembro de 1959^a. Mi gradaniĝis en la Universato de Punjabo kiel Bakalaŭron pri Pedagogio en 1981^a.

En urbo Islamabad-o (Pakistano) kie mi loĝis kun mia edzino kaj miaj 4 filoj kaj havis vojaĝagentejon, mi partoprenis –kune kun aliaj 5000 homoj– en manifestacio kontraŭ la t.n. Leĝo de Blafemo. Tiu ĉi leĝo altrudas ege gravajn punojn –eĉ mortpunojn– kontraŭ tiuj homoj kiuj malrispektas aŭ insultas ĉu Mahometon ĉu Koranon. Post tiu manifestacio komencis persekuto de barbuloj senlipharaj (muzulmanaj radikalaj studentoj) kontraŭ mi kaj miaj familianoj. Mallonge



poste ili batadis mian edzinon, kaj, kiam mi iris por denunci ĝin al la policejo, policano respondis: “Vi manifestaciis kontraŭ la islama leĝo de Pakistano. Kiel ni povas protekti vin? Ni ne povas agi kontraŭ tiuj grupoj de studentoj, kaj.. ve! (ride mokanta) Vi ne estas ministro, ĉu?” Poste tiuj grupoj mortminacis miajn parencojn. La barbuloj sukcese premis ĉiujn por ne dungi miajn parencojn pri ia ajn laboro –eĉ por la kristanindaj laboroj– *kristanindaj laboroj estas, en Pakistano, tia laboroj kiaj ekz: la purigado de fekejoj publikaj; ĉar por la ekstremistoj ni, kristanoj, estas malpuruloj kiuj nur meritas tiajn taskojn, kaj, kelkfoje, eĉ neniun!* La kulmino de la situacio alvenis kiam barbuloj senlipharaj lanĉis brulantajn radojn en mian domon por bruligi ĝin. Post tio mi decidis elmigri kaj finfine mi trovis rifuĝejon sekurecan en Hispanio. En Hispanio oni povas legi la Biblion, ĉeesti katolikan meson, aŭ porti videble krucifikson kaj neniu kraĉas, insultas aŭ batas onin pro tio. Ĉi tie estas religia libereco. Tamen, ni povas plu esti celo de atakoj de islamistoj fanatikaj ĉi tie. Ni plu sentiĝas persekutataj. Mi rilatas kun hispanoj harmonie, sed kiam mi trovas virojn aŭ virinojn el Pakistano

–loĝantajn ĉi tie— mi konstatas (ne sciante ili ke mi ne estas muzulmano) ke ili laŭdas la socialajn avantaĝojn de ili ĝuataj en Hispanio, sed ili malamas la hispanojn kaj revas superŝuti ilin demografie por poste “koltranĉi ilin!”

SEKVESTRITA DE BOKO HARAM

Atesto de Rebecca Britrus.

Kvankam umduono el la loĝantaro de Niĝerio estas kristana, ume 2000 ĝis 3000 kristanoj estas murdataj ĉiujare de islamistoj. Por la ĝihadismo estas grave kontroli la plej loĝatan landon de Afriko (ĉ. 200 milionoj da homoj): se Niĝerio falus, Afriko falus. En Niĝerio estas granda koruptiĝo inter oficiuloj, sed oni ne povas sekurece kritiki ilin, dum kelkaj armeanoj kaŝe apogas kaj provizas armilojn al la islamaj teroristoj de Boko Haram.



Mi naskiĝis en Lokodisa (Niĝerio) kaj mi estas 26-jaraĝa. Poste mi loĝis en vilaĝeto Dogon Ĉuku kun mia edzo – kiu kulturis la teron kaj vendis ĝiajn fruktojn- kaj miaj du filoj. Iun tagon Boko Haram atakis la vilaĝeton. Mia edzo sukcesis forkuri, sed la teroristoj kaptis min kaj miajn filojn. Survoje al ties kampadejo mia 1-jaraĝa filo ekploris. Tiam teroristo lanĉis lin en la riveron por silentigi lin. Ili lasis mian filon droni antaŭ mi, dum alia teroristo seksperfortis min: pro tiu perforto mi gravediĝis kaj mi poste naskis mian filon Kristoferon. Du jaroj daŭris mia sekvestro – irante de unu kampadejo en alian- dum tiu tempo mi suferis ĉiajn ofendojn, krom la necertecon ĉu mi plu vivos la sekvantan tagon. Mi perdis mian esperon kiam la teroristoj komencis mortigi al la virinoj de mia grupo kiuj rufuzis islamiĝi kaj edziniĝi ilin. Poste mi komprenis ke Dio estas ĉie ajn – eĉ en mia infero! Ni estis instruataj per Korano por fariĝi ĝihadistoj. Iufoje la teroristoj klopodis konvinki min por vesti bombozonon kaj eksplodigi ĝin kiel atencan: mi pensis: “jen la ŝanco trompi ilin kaj forkuri kun miaj du filoj, tamen la teroristoj sed ili ne mordis la logaĵon kaj mi rifuzis la bombozonon. Finfine, iun tagon - profitante la konfusiĝon de helikoptera atako de la armeo- mi forkuris kun miaj du filoj. Mi provizis mian forton per konstantaj preĝoj dum mia kaptiveco. Mi neniam konvertiĝis al islamo malgraŭ multaj premoj, kaj ne perdis mian fidon je Jesuo Kristo. Pro tiu fido mi sukcesis pardoni miajn turmentintojn. Poste mi retrovis mian edzon kaj li akceptis mian filon Kristoferon kaj min sen ia pridubo.

Ĉiutage mi rememoras ke mia filo Kristofero estas ido de perforto, sed malgraŭ tio, mi amas lin, ĉar filo ĉiam estas beno de Dio, kio kompensas la suferon de lia traŭma deveno.

KONKLUDA MANIFESTO DE LA KONGRESO:

- Ni kondamnas ĉian ajn perforton aŭ militon nome de dio aŭ de ajna religio. Ni ankaŭ denuncas la kriman uzon kiun faras de la nomo de Dio islamaj terorismaj grupoj kiel Boko Haram, DAĜŜ, Al Nusra, Anshar al Sharia, Al Qaeda, la Talibanoj de Pakistano aŭ Afganio, kaj ceteraj. Neniel malamon nome de Dio! Oni ne plu faru militon nome de Dio! (el Papo Francisko).
- Ni denuncas la kriman agadon de la ĝihadismaj grupoj, kiuj usante la religion kiel ilon de senkulpiĝo, atencas kontraŭ la homaj rajtoj per seksperfortoj, turmentoj, murdoj, minacoj kaj sekvestroj kontraŭ religiaj minoritatoj kaj detruas la religian liberecon de ĉiuj aliaj kredantoj.
- Ni instigas al la estraroj de tiuj landoj, kie la teroristoj agas, por ke ili batalu kontraŭ la terorismo energie kaj senhezite, kaj ni postulas el la internacia komunumo ties kunlaboron urĝan je tiu ĉi batalo; kiu riske trafas la tutan homaron; pere de difinitaj agoj apoge al la estraroj batalantaj kontraŭ ĝihadismo.
- Ni kondamnas la pasivecon de la Okcidentaj Estraroj. Ni denuncas kolere la indiferentecon de tiom da institucioj kaj postulas el ili urĝan reagon antaŭ la nuna situacio kaj la aplikon de konkretaj rimedoj kontraŭ la ĝihadismo, kaj postulas ke tiuj estraroj kuraĝigu iniciatojn por kontraŭstari la religian persekuton ĉu nacie ĉu internacie.
- Ni postulas el la Eŭropa Komisiono, el la Eŭropa Parlamento, el la Amerika Organizo de Ŝtatoj, el la Araba Ligo, kaj el UN frapklarajn manifestaciojn kaj agojn konkretajn, rapidajn kaj efikajn por puni la krimojn de la ĝihadistoj kaj gardi ties viktimojn.
- Ni petas veran kaj objektivan raportadon el la respondeculoj de la amaskomunikiloj kaj informagentejoj: la viktimoj de la religiaj persekutoj estas tiel pro siaj religiaj kredoj, ne pro aliaj cirkonstancoj. Bonvolu ne kaŝigu tiun menciion fundamenta por kompreni tiun ĉi gentomurdon.

La peko de l' taliban' **8 Nova homo.**

La ŝtormo malkreskas iom post iom, kaj baldaŭ estas neniu vento kaj suno brilas denove. Pro El Fu ne plu estas ie ajn.

La karavano daŭrigis sian vojaĝon malrapide ĝis Asra, la plej grava urbo de la lando, kie oni devas negoci, se oni volas riĉiĝi, kaj dekkvin tagojn poste Abdul' Saleh' revenis tra la vojo, laŭ kiu li venintis.

Li suferis du novajn sablo(tormojn, sed Pro El Fu ne aperis dum ili.

Kiam li revenis hejmen, sia edzino diris al li, ke Aben' Abdala', la plej riĉa viro el la urbo, finfine petis manon de fratino Sanj'.

Tuj post ripozoj pri la vojaĝo, tiun saman tagon, li iris al vendejo de sia patro klarigi al li pri siaj demarŝoj kaj ekkoni de li mem la detalojn de la manpeto. Ankoraŭ ne estis aranĝita la dato por geedziĝo, kvankam la fianĉo volis, ke ĝi okazos baldaŭ. Abdul' Saleh' kalkulis, ke li bezonas tutan jaron pretigi sian fratinton esti bona edzino. Unue, li devis igi ŝin akcepti bonvole tian edziniĝon, ĉar ŝi vere estas infanino dek ses jaraĝa, kaj ŝi ne komprenas, ke ŝi devas edziniĝi al maljunulo, kiu aĝas jam kvardek, eĉ se li estas la plej riĉa homo el la tuta regiono.

Kiam li jam konvinkis sian patron ne rapidi, li dediĉis sian tempon prepari sian fratinton. Tiucele kaj li kaj edzino Rejin' komencis ofte vizitadi la domon de siaj gepatroj dum granda parto de la tago.

«Fratino, vi ne povas decidi al kiu vi edziniĝos. Ni ĉiuj viroj estas same en lito, kvankam edziniĝi al oldulo havas sendubajn avantaĝojn».

«Ĉu vere? Kiaj? Mia vivo apud li estos teda».

«Ne. Aben' Abdala' estas tre klerigita kaj li havas bonan konversacion. Kaj li estas korinklina. Li zorgos bone pri vi. Vi vidos».

«Kiel vi scias pri tio?»

«Fratnjo, junulo estas senpacienca, kaj se vi malobeas lin, li batos vin per mano aŭ per bastono. Sed Aben' estas pacienca kaj persistema, kaj konvinkos vin pri tio, ke via feliĉo baziĝos grandparte sur via obeemo al edzo. Kaj li havos detalojn kun vi, kiujn vi ne povas imagi nun. Sed vi devas esti obeema, ĉar tiel vi honoras viajn patron kaj patrinon, kiuj volas la plej bonon por vi. Pro tio ili volas edzinigi vin al li, ne dubu pri tio. Vi estos la plej riĉa virino

en la urbo».

«Kaj al kio tio utilas al mi, se mi ne amas lin?»

Abdul' Saleh' rigardadis al ŝi, kun malfermita buŝo. «Ĉu vi amas alian viron?»

«Nu, mi ŝatas virojn ĉirkaŭ mia aĝo».

«Rigardu, fratino, kredu min: mi vidis viraĉaron ŝtonigi virinon ĝismorte pro malpura konduto. Se vi marŝas maldece, vidos vin tiuj, de kiuj vi volas esti vidata, sed tiuj, de kiuj vi ne volas esti vidata, ankaŭ vidos vin. Inter ili estas fiaj homoj, kiuj eble volos perforti vin. Malebligi ĝin povas kosti al vi vian vivon. Se vi ne malebligas tion, ili mem denoncos vin pro via tentado, kaj oni ŝtonigos vin ĝismorte, ĵetante honton sur la domon de via patro. Se vi sekvas mian konsilon, ni prokrastos vian geedziĝon ĝis kiam vi jam estos pretigita. Se ne estas tiel, mi diros al patro, ke oni rapidigu ĝin kaj vi edziniĝos la venontan monaton, kiel via fianĉo deziras. Vi decidu. Ĉu ni havas interkonsenton?»

«Kian konsenton?», ŝi diris nerveze.

«Se vi promesas al mi fari ĉion, kion mi diros al vi, mi povas prokrasti vian edziniĝon unu jaron. Se ne, vi edziniĝos la venontan monaton kaj vi suferos pli».

«Nu..., frato, mi ne povas elekti multe, ĉu?»

«Ne. Vi edziniĝos al Aben' Abdala' eĉ se patro devos puŝi vin en imamejon kaj subskribi la kontrakton je via nomo. Vi scias, ke li povas fari tion».

«Bone, frato. Mi konsentas. Ni havas kontrakton».

Abdul' Saleh' ĉirkaŭbrakis sian fratinn kaj kisis ŝian frunton. Poste li legis al ŝi la tri ĉapitrojn, kiujn **La Libro Sankta** dediĉas al virinoj. Poste li petis Zulemon, ke ŝi ne laborigu fratinn dum la cetera parto de la tago, ĉar ŝi devas mediti.

Ĉiun tagon li conversaciis kun sia fratino pli ol du horoj, kaj parkerigis ŝin longajn paragrafojn de **La Libro Sankta de Ĉiuj Kredantoj**.

Sed li ne nur instruis sian fratinn pri tio, kion Dio esperas de virino. Li ankaŭ klarigis tion, kion esperas de ŝi edzo, patro kaj familio; same kiel tion, kion ŝi povas kaj devas esperi de sia edzo, kiu devas protekti, zorgi ŝin kaj samtempe esti zorgata de ŝi. Tio

signifas feliĉon kaj longan geedzan vivon.

Estas kelkaj situacioj en kiuj edzo repudias sian edzinon, jes, kaj ne ĉiuj venas el tio, ke ŝi ne plenumas siajn devojn kiel edzinon, sed estas vere, ke ĉiam temas pri malfeliĉo, frustrado kaj tensio ene de la paro.

«Se via edzo», Abdul' Saleh' diris al sia kara fratino, «iam diras al vi, ke li volas duan edzinon, ne fermu vian menson al la ideo refleksi, ĉar li povas repudii vin por edziĝi al ŝi. Male, konu ŝin kaj instru ŝin, flankiĝu al via edzo ĉiam, sed helpu lian duan edzinon. Se li amas ŝin, amu ŝin vi ankaŭ. Kaj instru ŝin: lernigu ŝin akcepti la trian edzinon, se iam estas tia, kaj bonvenigu ilin, ĉar ju pli da edzinoj li havas, des malpli da laboro estos por vi».

«Sed, frato, normale estas nur unu edzino».

«Jes, sed **La Libro**, permesas lin havi ĝis kvar. Tio venas el tio, ke ni estas batalema popolo, la popolo de Dio. Se via edzo mortas kaj lasas vin sola kun viaj gefiloj kaj sen mono, via bofrato aŭ najbaro povas preni vin kiel duan edzinon laŭleĝe sen devi elekti inter vi kaj la edzino, kiun li jam havas, ĉar tio estus kruela, kaj en nia kulturo tio estas nenecesa. Kaj li kondukos al vi same kiel al sia unua edzino, kaj al viaj gefiloj same kiel al siaj gefiloj, ĉar li adoptintus ilin de la momento, kiam li edziĝis al vi. Tial se via edzo havas duan nupton, ne pro tio li ignoros vin aŭ viajn gefilojn».

Tio, kion frato diris al ŝi ĝenis ŝin multe, sed Abdul' Saleh' ĝuis la maloftan virton irigi homojn al loko de aliaj homoj, kaj lia fratino ne estis imuna al lia persona ĉarmo.

«Vi ĉiam povas esti», li diris, «la plej ĝentila al via edzo, la plej submetata, la plej nevidanta kiom neperfekta li estas por vi. Kaj se vi fojfoje havas mankon, prenu bastonon kaj petu al via edzo, ke li punu vin. Certe li ne faros tion, sed se li faras, akceptu ĝin kun humileco kaj amo. Tion diras **La Libro**, ke oni esperas de vi kaj la devo lia, kvankam estas vere, ke li povas apelacii al kompato de Dio por prokrasti la punon sen date. Ne forgesu, ke bona edzino kreskigas la esperojn de edzo, kiu ne povas ne meriti ŝin, kaj tiujn de la ceteraj edzinoj, se estas».

La lecionoj de Abdul' Saleh' estis tiaj, kaj Sanj', scivolema, demandis al Rejin' ĉu sia frato mistraktas ŝin.

«Li neniam batis min», ŝi diris. «Nur manfrapeton ene de amoludo».

«Ĉu vi neniam faris ion por ke li devos puni vin?»

«Je la komenco, kelfoje».

«Kaj ĉu li ne batis vin?»

«Pli malbone. Vidi lian tristan vizaĝon dolorigis min pli multe. Mi donis bastonon al li por esti punata, kaj li diris: *Rejin', se mi batas vin, vi ne plu sentos kulpa, sed se mi ne batas vin, vi doloros ĉiun fojon, kiam vi memoros la frustron, kiun vi kaŭzas min.* Kaj mi ne povas kaŭzi tion al li denove. De tiu tago la vorto de mia edzo estas mia leĝo».

Demokratio, libereco, respekto

Hieraŭ mi iris aŭskulti konferencon kaj poste provis ĉeesti politikan kunvenon. Ĉe la pordo estis cirkaŭ cent homoj, kiuj provis malebligi tion. Mi vidis policanojn tie, kiuj malebligis, ke ili venu en la ejon bojkoti la kunvenojn. Mi miras, ke memdiritaj demokratoj kapablas fari tion. Ŝajnas, ke kelkaj hispanoj opinias, ke devas esti libereco pri opinio kaj esprimo nur se ili konvenas al ili, kaj neas tiun rajton al tiuj, kiuj opinias diverse al ili. Kompatinduloj.

Sed tio ja okazis en Hispanio antaŭ pli ol okdek jaroj: estas bone esti *progresisma*, kaj oni malpermesu esti *tradicia*. Laŭ ili estas progresisme agi kaj teorie kaj praktike kontraŭ kristanoj kaj monarĥiistoj, ĉar oni devas perforte adoptigi kutimojn kaj vivvalutojn el eksterlando, ĉar ili estas pli lertaj ol ni. Ili ja estas kompatindaj junuloj, kiuj ne komprenas, ke fatrante tion, ili mortigas demokration en Hispanio. Vere ne estas demokratio ĉe ni, eĉ ne formale, sed oni devus labori cele al atingi tion, ne malen, kiel tiuj ignorantoj kaj perfiduloj faras.



Ĉar ataki Hispanion estas ataki demokration, ĉar ni estas ne rusoj, sed hispanoj. Ne sovetoj, sed demokratoj. En la foto oni povas vidi la homojn, kiuj ne trovis lokon aŭskulti Santjagon Abaskal en Mursjo hieraŭ.

Ĉe la leviĝo de l'suno la dudek Ĉunuan de Hator, en la tendaron apud Sodaj Lagoj venis el Memfiso ordono, laŭ kiu tri regimentoj devis marŝi Libion kaj resti garnizone en la urboj, la resto de la egipta armeo kun la kronprinco devis reveni hejmen.

La armeo akceptis la ordonon per ĝojaj krioj, ĉar la kelktaga restado en la dezerto jam komencis esti peza por ili. Malgraŭ la transportoj el Egipto kaj el la venkita Libio, oni ne havis tro multe da nutraĵo; la akvo en la putoj, rapide elfositaj, jam estis elĉerpita; la suna fajro bruligis la korpon, la flavruĝa sablo pikis la pulmojn kaj okulojn. La soldatoj komencis malsaniĝi je disenterio kaj je inflamo de l' palpebroj.

Ramzes ordonis kunmeti la tendojn. Tri regimentojn de aŭtohtonaj egiptanoj li sendis Libion, admonante la soldatojn delikate agi kun la loĝantoj kaj neniam vagi unuope. La reston de la armeo li direktis al Memfiso, lasinte malgrandan garnizonon en la fortikaĵo kaj en la vitrofandejo.

Je la naŭa horo matene, malgraŭ la terura varmego, ambaŭ armeoj jam ekmarŝis: unu al la nordo, la alia al la sudo.

Tiam al la kronprinco proksimiĝis la sankta Mentezufis

kaj diris:

—Bone estus, se via ekscelenco povus pli frue atingi Memfison. En la mezo de la vojo atendos vin freŝaj ĉevaloj...

—Do mia patro estas danĝere malsana? —ekkriis la princo.

La pastro klinis la kapon.

La princo lasis al Mentezufis la superan komandon, petante lin, ke li en nenio ŝanĝu la donitajn ordonojn, ne interkonsiliĝinte kun la civilaj generaloj. Kaj li mem, preninte Pentueron, Tutmozison kaj dudek plej bonajn aziajn rajdistojn, rapide ektrotis al Memfiso.

Post kvin horoj ili atingis la mezon de la vojo, kaj kiel diris Mentezufis, ili trovis tie freŝajn ĉevalojn kaj novan sekvantaron. La azianoj restis tie, la princo kun siaj du kunuloj kaj kun la nova eskorto, post mallonga ripozo, ekveturis antaŭen.

—Ve al mi! —ĝemis la eleganta Tutmozis. —Ne sufiĉas, ke jam de kvin tagoj mi ne banis min kaj ne vidis la rozan oleon, sed mi devas ankoraŭ plenumi du streĉitajn marŝojn en unu tago!... Mi estas certa, ke kiam ni atingos Memfison, neniun dancistino volos ekrigardi min...

—En kio vi estas pli bona ol mi? —demandis la princo.

—Mi estas pli delikata! —sopiris Tutmozis. —Vi, princo, kutimis al la rajdado, kiel Hiksos, kaj Pentuer povus vojaĝi eĉ sur ruĝe brulanta fero. Sed mi, tiel delikata...

Ĉe la subiro de la suno la vojaĝantoj venis al alta monteto, de kies supro sin sternis antaŭ ili eksterordinara pentraĵo. De malproksime oni vidis la verdan valon de Egipto, kaj sur ĝia fono, kvazaŭ vico de ruĝaj flamoj, brilis la triangulaj piramidoj. Iom dekstre de la piramidoj, la suproj de la pilonoj de Memfiso, envolvita en bluetan nebulon, ankaŭ ŝajnis bruli.

—Antaŭen!... Antaŭen!...
—insistis la princo.

Post momento ree ĉirkaŭis ilin la flavruĝa dezerto kaj ree ekbrilis la vico de la piramidoj, ĝis fine ĉio fandiĝis en pala krepusko.

Kiam falis la nokto, la vojaĝantoj atingis la grandegan landon de la mortintoj, kiu sur la maldekstra bordo de la rivero sur la altaĵoj okupis spacon da kelkdeko da kilometroj.

Tie dum la Antikva Ŝtato oni enterigis por eterne egiptanojn: la reĝojn en grandegaj piramidoj, la princojn kaj altrangulojn en malpli grandaj, la simplulojn en terdomoj. Tie ripozis milionoj da mumoj ne nur de homoj, sed ankaŭ de hundoj, katoj, birdoj, unuvorte de ĉiuj estaĵoj, kiuj estis karaj al la

homo dum lia vivo.

En la tempoj de Ramzes, oni transportis Tebojn la reĝan kaj riĉulan tombejon, kaj en la najbaraĵo de la piramidoj oni enterigadis nur kamparanojn kaj metiistojn de la ĉirkaŭaĵo.

Inter la dissemitaj tomboj la princo kaj lia sekvantaro renkontis areton da homoj, glitantaj kiel ombroj.

—Kiu vi estas? —demandis la estro de la eskorto.

—Ni estas malriĉaj servistoj de l' faraono, kaj ni revenas de niaj mortintoj... Ni alportis al ili iom da rozoj, biero kaj plataj kukoj...

—Eble vi vizitis ankaŭ fremdajn tombojn?

—Ho dioj! —ekkriis unu el la aro —ĉu ni estus kapablaj al tia sakrilego?... Nur la malvirtaj tebanoj (sekiĝu iliaj brakoj!) maltrankviligas la mortintojn, por drinki ilian proprajon en la drinkejo.

—Kion signifas la fajroj tie, norde? —intermetis la princo.

—Sendube, sinjoro, vi venas de malproksime, se vi ne scias tion —oni respondis.

—Morgaŭ ja revenas nia kronprinco kun la venka armeo... Granda militestro!... En unu batalo li rompis la mizerajn libianojn... La popolo eliris el Memfiso, por solene saluti lin... Tridek mil kapoj... Kia krio leviĝos!...

—Mi komprenas —murmuretis la princo al Pentuer. —La sankta Mentezufis sendis min antaŭe, por ke mi ne partoprenu en la triumfa iro... Sed estu tiel, hodiaŭ...

La ĉevaloj estis lacaj kaj oni devis halti. La princo sendis kelke da rajdistoj mendi ŝipojn sur la rivero, kaj la reston de la sekvantaro li haltigis apud aro de palmoj, kiuj tiam kreskis inter la piramidoj kaj la sfinkso.

La piramidoj formas nordan finon de la grandega tombejo. Sur ebenaĵo, kies supraĵo ne superas unu kvadratan kilometron, kovrita de kreskaĵoj de la dezerto, dense staras multenombraj tomboj kaj malgrandaj piramidoj, kiujn superas la tri plej grandaj piramidoj: de Ĥeops, Kefren kaj Mikerin, fine Sfinkso. La interspaco inter la kolosaj konstruaĵoj atingas apenaŭ kelcenton da paŝoj. La tri piramidoj staras en unu vico, de la nord-oriento al la sud-okcidento; oriente de ĉi tiu linio, plej proksime de Nilo kuŝas Sfinkso, ĉe kies piedoj sin etendis la subtera templo de Horus.

La piramidoj, kaj precipe la piramido de Ĥeops, kiel verko de la homa laboro, timigas per sia grandeco. Tio estas pinta ŝtona monteto, tridek kvin etaĝojn alta (cent tridek kvin metrojn), staranta sur kvadrata fundamento, kies ĉiu flanko estas ĉirkaŭ tricent kvindek paŝojn longa (ducent dudek sep metrojn). La

piramido okupas kvin hektarojn, kaj ĝiaj kvar triangulaj muroj kovrus naŭ hektarojn. Por konstrui ĝin oni uzis tian amason da ŝtonoj, ke ili sufiĉus por muro pli alta ol la homa kresko, duonon da metro larĝa, du mil kvincent kilometrojn longa!...

Kiam la princa sekvantaro metis la tendojn sub la mizeraj arboj, kelke da soldatoj serĉis akvon, aliaj eltiris biskvitojn el la sakoj, Tutmozis falis teren kaj ekdormis. La princo kaj Pentuer komencis promeni kaj interparoli.

La nokto estis tiel luma, ke oni povis vidi de unu flanko la grandegajn siluetojn de la piramidoj, de la alia la figuron de Sfinkso, kiu kompare kun ili ŝajnis malgranda.

—Mi estas ĉi tie jam la kvaran fojon —diris la princo —kaj ĉiam mian koron plenigas la mirego kaj sopiro. Kiam mi studis ankoraŭ en la supera lernejo, mi pensis, ke ricevinte la tronon, mi konstruos ion pli faman ol la piramido de Ĥeops. Sed hodiaŭ mi ridas mian propran malprudenton, kiam mi rememoras, ke la granda faraono pagis mil sescent talentojn [ĉirkaŭ dek milionoj da frankoj] nur por la legomoj por la laboristoj... Kie mi prenis mil sescent talentojn, eĉ nur tiom da homoj!

—Ne enuiu, sinjoro, Ĥeopson —respondis la pastro. —Aliaj

- faraonoj lasis pli bonajn verkojn: lagojn, kanalojn, ŝoseojn, templojn kaj lernejojn.
- Ĉu oni povas kompari tion kun la piramidoj?
- Certe ne —vive respondis la pastro. —Por mi kaj por la tuta popolo ĉiu piramido estas granda krimo, kaj la plej granda —tiu de Ĥeops...
- Vi troas —penis trankviligi lin la princo.
- Tute ne. Sian grandan tombon la faraono konstruis tridek jarojn, dum kiuj cent mil homoj laboris ĉiujare po tri monatoj. Kaj kia estas la utilo de tia laboro?... Kiun ĝi nutris, resanigis, vestis?... Kontraŭe, ĉiujare dum la laboro pereis dek ĝis dudek mil homoj... Alivorte la tombo de Ĥeops postulis kvincent mil kadavrojn... Kaj kiom da sango, larmoj, suferoj, kiu povus ilin kalkuli? Jen kial, sinjoro, oni ne devas miri, ke la egipta kamparano ankoraŭ hodiaŭ kun timo rigardas al la okcidento, kie la horizonton superstaras la sangaj aŭ nigraj siluetoj de la piramidoj. Ili ja estas atestantoj de liaj turmentoj kaj vana laboro... Kaj kiam oni pensas, ke ĉiam estos same, ĝis kiam ĉi tiuj pruvoj de la homa malhumileco disfalos kaj fariĝos polvo... Sed kiam tio okazos! Jam tri mil jarojn ili timigas nin per sia aspekto, kaj iliaj muroj estas ankoraŭ glataj kaj la grandegaj surskriboj —legeblaj.
- En tiu nokto, en la dezerto vi alie parolis —intermetis la princo.
- Ĉar tiam mi ne rigardis ilin. Sed kiam mi havas ilin antaŭ la okuloj, kiel nun, ĉirkaŭas min la ploregantaj spiritoj de la turmentitaj kamparanoj kaj murmuretas: "Rigardu, kion oni faris kun ni!... Tamen ankaŭ niaj ostoj sentis la doloron kaj sopiris al la ripozo..."
- Ramzeson malagrabable impresis ĉi tiu eksplodo.
- Mia sankta patro —diris li post momento —alie prezentis al mi ĉi tiujn aferojn. Kiam ni estis ĉi tie antaŭ kvin jaroj, la dia sinjoro rakontis al mi la jenan historion:
- "Dum la regado de l' faraono Tutmozis, venis etiopiaj senditoj por difini la sumon de la pagotaj tributoj. Tio estis malhumila popolo! Ili diris, ke unu perdita milito signifas nenion, ĉar en la dua la sorto povas esti favora por ili, kaj kelke da monatoj ili marĉandis pri la tributo. Vane la saĝa reĝo, volante delikate klarigi al ili, montris al ili niajn ŝoseojn kaj kanalojn. Ili respondis, ke en sia lando ili havas la akvon senpage, kie ili volas. Vane oni malkovris al ili la trezorejojn de la temploj, ili diris, ke sia tero kaŝas pli multe da oro kaj multekostaj ŝtonoj, ol la tuta Egipto. Vane la sinjoro ekzercis

antaŭ ili siajn armeojn, ili respondis, ke etiopianoj estas pli multenombraj, ol la soldatoj de lia sankteco. Tiam la faraono alkondukis ilin en ĉi tiun lokon, kie ni staras kaj montris al ili la piramidojn. La etiopiaj senditoj ĉirkaŭiris ilin, legis la surskribojn kaj... en la sekvinta tago subskribis la traktaton, kian oni postulis de ili." —Ĉar mi ne komprenis la historion, —daŭrigis Ramzes —mia sankta patro klarigis ĝin al mi. "Filo —diris li —ĉi tiuj piramidoj estas la eterna pruvo de la superhoma potenco de Egipto. Se iu homo dezirus konstrui al si piramidon, li kunmetus malgrandan amaseton da ŝtonoj kaj post kelke da horoj li forlasus la laboron, demandinte sin mem: por kio ĝi servos al mi? Dek, cent aŭ mil homoj amasigus iom pli multe da ŝtonoj, kunŝutis ilin senorde kaj forlasus la laboron post kelke da tagoj. Ĉar por kio servus la laboro? Sed kiam egipta faraono, kiam la egipta ŝtato decidus amasigi ŝtonojn, ĝi kunpelas milojn da homoj kaj konstruas eĉ kelkdekon da jaroj, ĝis kiam estos finita la laboro. Ne grave estas, ĉu la piramidoj estis necesaj. Estas grave, ke la volo de l' faraono, unufoje esprimita, estu plenumita." Jes Pentuer, la piramido ne estas la tombo de Ĥeops, sed la volo de Ĥeops. Volo, kiu posedas pli da plenumantoj, ol iu ajn reĝo en la mondo, kaj tian ordon kaj persiston en la agado, kiel la dioj. Ankoraŭ en la lernejo oni instruis al mi, ke la volo estas granda forto, la plej granda forto en la mondo. Kaj tamen la homa volo povas levi apenaŭ unu ŝtonon. Kiel granda estas do la volo de

l' faraono, kiu amasigis monton da ŝtonoj nur tial, ke tiel plaĉis al li, eĉ sen iu ajn celo.

—Ĉu ankaŭ vi, sinjoro, volus same pruvi vian potencon?...

—demandis subite Pentuer.

—Ne —respondis la princo sen ŝanceliĝo. —Kiam la faraonoj jam unu fojon montris sian potencon, ili povas esti kompatemaj. Se nur oni ne provus kontraŭstari iliajn ordonojn...

—Kaj ĉi tiu junulo havas apenaŭ dudek tri jarojn! —diris al si la timigita pastro.

Ili sin turnis al la rivero kaj iom da tempo iris silente.

—Kuŝiĝu, sinjoro —diris la pastro —ekdormu. Ni faris ne malgrandan vojaĝon.

—Ĉu mi povas ekdormi?...

—respondis la princo. —Jen ĉirkaŭas min miloj da kamparanoj, kiuj, laŭ via diro, pereis dum la konstruado de la piramidoj (kvazaŭ sen la piramidoj ili povus vivi eterne!). Jen mi pensas pri mia sankta patro, kiu eble agonias en ĉi tiu momento...

La kamparanoj suferas, la kamparanoj verŝas la sangon!... Sed kiu pruvos al mi, ke mia patro ne pli suferas sur sia multekosta lito, ol viaj kamparanoj, portantaj varmegajn ŝtonojn?... La kamparanoj, ĉiam la kamparanoj!... Por vi, pastro, nur tiu indas la kompaton,

kiun manĝas la pedikoj. Tuta aro da faraonoj malsupreniris en la tombojn; kelkaj agoniis en doloro, kelkajn oni mortigis. Sed vi ne memoras pri ili, vi pensas nur pri la kamparanoj, kies tuta merito estas, ke ili naskis aliajn kamparanojn, ĉerpis la nilan koton aŭ puŝis en la buŝegojn de siaj bovinoj hordeajn globetojn. Kaj mia patro... kaj mi?... Ĉu oni ne mortigis mian filon kaj virinon de mia domo? Ĉu estis por mi kompatema Tifono en la dezerto? Ĉu ne doloris miaj ostoj post la longa vojaĝo?... Ĉu la libiaj sagoj ne fajfis super mia kapo? Ĉu mi havas traktaton kun la malsano, doloro, morto, por ke ili estu por mi pli kompatemaj, ol por la kamparano?... Rigardu tien... La azianoj dormas kaj trankvilo loĝas en ilia brusto; kaj mi, ilia sinjoro, ĉagreniĝas pri la hieraŭa tago kaj maltrankviliĝas pri la morgaŭa. Demandu centjaran kamparanon, ĉu dum tuta sia vivo li suferis tiom da maldolĉo, kiom mi dum la kelke da monatoj, kiam mi estis vic-reĝo kaj militestro?...

Antaŭ ili malrapide, de la fundo de l' nokto eliĝis stranga ombro. Tio estis konstruaĵo kvindek paŝojn longa, tri etaĝojn alta, havanta ĉe la flanko kvinetaĝan turon de neordinara formo.

—Kaj Sfinkso —diris la incitita princo —pure pastra verko!... Ĉiufoje, kiam mi vidis ĝin, tage

aŭ nokte, ĉiam turmentis min la demando: kio tio estas kaj por kio?... La piramidojn mi komprenas. La potenca faraono volis montri sian forton, aŭ eble, kio estas pli prudenta, li volis garantii al si eternan vivon en trankvilo, kiun neniu ŝtelisto aŭ malamiko povus rompi. Sed ĉi tiu Sfinkso!... Sendube tio estas nia sankta pastraro, kiu havas tre grandan kaj saĝan kapon, kaj sube leonajn ungegojn... Abomena statuo, enigma, kiu ŝajnas esti fiera, ke apud ĝi ni havas aspekton de akridoj. Ĝi estas nek homo, nek besto, nek ŝtonego... Kio do ĝi estas? kian signifon ĝi havas? Kaj ĝia rideto... Vi admiras la eternan vivon de l' piramidoj —ĝi ridetas; vi iras paroli kun la tomboj —ĝi ankaŭ ridetas. Ĉu verdiĝas la kampoj de Egipto, ĉu Tifono pelas siajn fajrajn ĉevalojn, ĉu sklavo serĉas liberecon en la dezerto, ĉu Ramzes Granda revenas kun la venkitaj popoloj —ĝi havas por ĉiuj la saman senvivan rideton. Dek naŭ reĝaj dinastioj pasis, kiel ombroj, ĝi ridetis kaj ridetus, se Nilo sekiĝus kaj Egipto pereus sub la sabloj. Ĉu tio ne estas monstro, tiom pli terura, ke ĝi havas dolĉan homan vizaĝon? Ĝi mem eterna, neniam ĝi sentis malĝojon pri la vanteco de la mondo, plena de mizeroj.

—Ĉu vi ne memoras, sinjoro, la

vizaĝojn de l' dioj —intermetis Pentuer —aŭ ĉu vi ne vidis mumon? Ĉiuj senmortaj same trankvile rigardas la aferojn, kiuj pasas. Eĉ la homo, se li mem jam pasis.

—La dioj iafoje favore aŭskultas niajn petojn —diris la princo kvazaŭ al si mem. —Sed ĝin kortuŝas nenio. Ĝi ne estas kompatato, sed grandega sarkasmo kaj timo. Se mi scius, ke en ĝia buŝo sin kaŝas antaŭdiro por mi, aŭ rimedo relevi la ŝtaton, eĉ tiam mi ne kuraĝus ĝin demandi. Jen kia ĝi estas ĉi tiu verko kaj bildo de l' pastroj. Ĝi estas pli malbona ol la homo, ĉar ĝi havas leonan korpon; pli malbona ol la besto, ĉar ĝi havas homan kapon; pli malbona ol la ŝtonego, ĉar en ĝi sin kaŝas nekomprenebla vivo.

En ĉi tiu momento alflugis al ili ĝemantaj kaj sufokitaj voĉoj, kies fonton ne eble estis difini.

—Ĝi kantas?... —demandis la princo kun miro.

—Ne. Oni kantas en la subtera templo —respondis la pastro. —Sed kial ili preĝas en ĉi tiu horo?

—Prefere diru al mi, kial ili preĝas, kiam neniu vidas ilin?

Pentuer, rapide sin orientinte, iris tien, de kie flugis la kantoj. La princo trovis ŝtonon, sur kiu oni povis sin apogi, kaj laca sidiĝis. Li etendis la manojn

post la kapo, sin klinis posten kaj rigardis la grandegan vizaĝon de Sfinkso.

Malgraŭ la foresto de la lumo, oni vidis klare la nehomajn trajtojn: la ombro aldonis al ili karakteron kaj vivon. Ju pli longe la princo rigardis la vizaĝon, des pli klare li sentis, ke lia opinio estis antaŭjuĝo kaj ke lia malamikeco estis senbaza.

Sur la vizaĝo de Sfinkso estis nenia krueleco, sed rezignacio. En ĝia rideto estis nenia sarkasmo, sed melankolio. Ĝi ne mokis la mizeron kaj vantecon de la homa vivo, ĝi ne vidis ilin.

Ĝiaj okuloj, plenaj de esprimo, rigardis trans Nilon, al landoj, kiuj por la homa rigardo kunfluas kun la horizonto. Ĉu ĝi observis la maltrankviligan kreskon de la asiria regno? la naskiĝon de Grekujo? la trudeman kuradon de Fenicianoj? la estontajn okazojn sur la bordoj de Jordano? Kiu divenos?...

La princo estis certa pri unu, ke ĝi rigardas, pensas kaj atendas ion kun trankvila rideto, inda de supernatura estaĵo. Ankaŭ ŝajnis al li, ke kiam tiu io aperos sur la horizonto, Sfinkso leviĝos kaj iros renkonte al ĝi.

Kio ĝi estos kaj kiam?... Mistero, kies graveco estis klare desegnita sur la eterna vizaĝo.

Sed tio devas okazi subite, ĉar Sfinkso de jarcentoj ne fermas la okulojn kaj rigardas, ĉiam rigardas...

Dume Pentuer trovis la fenestron, tra kiu el la subtero fluis la ĝema pastra kanto:

Ĥoro I. —Leviĝu, radiantanta kiel Izido, kiel leviĝas Sotis sur la firmamento en la komenco de la suna jaro.

Ĥoro II. —La dio Amon-Ra estis ĉe mia dekstra kaj maldekstra flanko. Li mem metis en miajn manojn la regadon de la tuta mondo, helpante min faligi miajn malamikojn.

Ĥoro I. —Vi estis ankoraŭ juna, vi portis plektitajn harojn, sed en Egipto nenio fariĝis sen via ordono, neniam oni metis la unuan ŝtonon de konstruaĵo sen via ĉeesto.

Ĥoro II. —Mi venis al Vi, estro de l' dioj, granda dio, sinjoro de la suno. Tium promesas al mi, ke aperos la suno kaj ke mi estos simila al ĝi, kaj Nilo, ke mi ricevos la tronon de Oziriso kaj posedos ĝin por ĉiam.

Ĥoro I. —Vi revenis en paco, estimata de la dioj, estro de du mondoj, Ra-Mer-amen-Ramzes. Mi garantias al vi regadon eternan, la reĝoj proksimiĝos al vi kaj honoros vin.

Ĥoro II. —Ho vi, vi Oziriso Ramzes, eterne vivanta filo de la ĉielo, naskita de la diino

Nut. Ĉirkaŭu vin via patrino per la ĉiela mistero kaj permesu, ke vi fariĝu dio, ho vi, vi Oziriso-Ramzes. [Tombaj surskriboj]

—Do la sankta sinjoro jam mortis!... —diris al si Pentuer.

Li foriris de l' fenestro kaj proksimiĝis al la loko, kie sidis la kronprinco, dronanta en revoj.

La pastro ekgenuis antaŭ li, falis sur la vizaĝon kaj ekkriis:

—Saluton al vi, faraono, estro de l' mondo!...

—Kion vi diras?... —ekkriis la princo, salte leviĝante.

—La Dio Sola kaj Ĉiopova verŝu sur vin saĝon kaj forton, kaj feliĉon sur vian popolon...

—Leviĝu. Pentuer... Do mi... do mi...

Subite li prenis la pastron je la brako kaj turnis lin al Sfinkso.

—Ekrigardu ĝin —diris li.

Sed oni vidis neniun ŝanĝon en la vizaĝo kaj en la figuro de la koloso. Unu faraono transpasis la limon de la eterneco, alia leviĝis kiel la suno, sed la ŝtona vizaĝo de la dio aŭ monstro restis la sama. Sur la lipoj delikata rideto por la teraj potencoj kaj gloro, en la rigardo atendado de io, kio devas okazi, sed oni ne scias kiam.

Baldaŭ revenis la senditoj de la rivero kun sciigo, ke la ŝipetoj estos pretaj.

Pentuer eniris inter la palmojn kaj ekkriis:

—Vekiĝu!... Vekiĝu!...

La viglaj azianoj tuj salte leviĝis kaj komencis bridu la ĉevalojn. Leviĝis ankaŭ Tutmozis, terure oscedante.

—Brr!... —murmuris li —kia malvarmo!... Apenaŭ mi ekdormis kaj jam mi povus rajdi, eĉ ĝis la fino de l' mondo, se nur ne al Sodaj Lagoj. Brr!... Mi jam forgesis la guston de la vino, kaj ŝajnas al mi, ke miajn manojn komencas kovri haroj, kiel ĉe ŝakalo. Kaj ĝis la palaco restis ankoraŭ du horoj. Feliĉaj kamparanoj!... La friponoj dormas nun, ne sentas bezonon sin bani, kaj ne iros al la laboro, antaŭ kiam la edzinoj ne satnutros ilin per hordea supo. Kaj mi, granda sinjoro devas kiel ŝtelisto vagi nokte en la dezerto, sen unu sola guto da akvo en la buŝo...

La ĉevaloj estis pretaj, Ramzes sidiĝis sur la sian. Tiam Pentuer proksimiĝis, prenis la bridon kaj kondukis la ĉevalon, piedirante.

—Kio?... —demandis la mirigita Tutmozis.

Sed tuj li alkuris kaj prenis la bridon de la ĉevalo de Ramzes ĉe la alia flanko. Kaj tiel iris ĉiuj, silente, mirigitaj per la konduto de l' pastro, kaj sentis, ke okazis io grava.

Post kelkcento da paŝoj finiĝis la dezerto, kaj antaŭ la vojaĝantoj sin etendis vojo inter kampoj.

—Sidiĝu sur la ĉevalojn —diris Ramzes —ni devas rapidi.

—Lia sankteco ordonas sidiĝi! —ekkriis Pentuer.

La ĉeestantoj mutiĝis de surprizo. Sed Tutmozis rapide rekonsciiĝis kaj metinte la manon sur la glavo, ekkriis:

—Vivu eterne, ĉiopova kaj favora nia estro, la faraono Ramzes!

—Li vivu eterne!... —kriegis la azianoj, svingante la armilojn.

—Mi dankas al vi, fidelaj miaj soldatoj —respondis la sinjoro.

Post momento la taĉmento galopis al la rivero.

Fino de la Dua Volumo



Mankas amiko kaj esperantisto

Oni ĵus konas la malgajan novaĵon, ke la 21an de novembro forpasis nia amiko kaj samideano Rodolfo Canet Martín. Mi memoras pri liaj konversacioj viglaj pri esperantismo kaj esperantistoj, pri la Intercivitana Milito de Hispanio, pri eraroj komunaj de esperantistoj, kaj ĉefe pri bonhumuro kaj vivĝojo.

Li estis amanto de poŝtmarkoj, kaj mi memoras, ke kiam mi vizitis UKn, mi sendis kelkajn oficialajn de la kongreso al li, ĉar li mem ne kuraĝis ĉeesti la kongresojn pro sia multaĝo, kaj devo zorgi pri edzino. Sed ni kune vizitis hispanajn renkontiĝojn, kiel tiuj de la Kataluna Kultura Semajno, organizitaj de Ludoviko Serrano, ankaŭ forpasinta.

Li ankaŭ estis tre religiema homo, tamen prudenta, kaj sciis kiam diskuti, kiam silenti. Kara amiko, kie ajn vi estas, mi salutas vin kaj deziras al vi plej bonon. Kaj ni sendas kondolencon al viaj familianoj, kiuj ĵus perdis vian kompanion kaj kuraĝigon.





Kajeroj el la Sudo

*Bulteno de Hispana Asocio
de Laboristoj Esperantistaj*



<http://www.gazetoteko.com/hale/kels101.pdf>



Canet kaj Bernabéu dum VEF Kongreso je 2003
ŝajnas atenti al tio, kion esperantistoj faras nun...

ISSN 1886-1938 (printita)
ISSN 1886-1997
Depósito legal: Z-2398-88